Universala Esperanto-Asocio

# EKZAMENOJ, LANDOJ, SIMPOZIO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2017-16 sendita el Budapeŝto, la 17an de junio.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

## Cerboj engaĝitaj en dek tri landoj – tutmonda ekzamentago

La 10an de junio sukcese okazis la 6a Tutmonda Ekzamentago. En 17 lokoj ekzameniĝis 112 personoj kaj la 8 japanaj kandidatoj trapasos sian ekzamenon en la 17a de junio.

La KER-ekzamenoj okazis en 13 landoj: Brazilio, Britio,Ĉinio, Francio, Germanio, Hispanio, Kolombio, Nederlando, Rusio, Serbio, Svedio, Svislando kaj Usono. Jen la laŭlandaj nombroj: de kandidatoj: Francio (21), Kolombio (15), Rusio (13), Ĉinio (11), Brazilio (10), Hispanio (6), Svislando (6), Germanio (5), Britio (5), Nederlando (4), Serbio (4), Usono (3), Svedio (2), Danio (2), Italio, Bulgario, Irlando, Kanado kaj Pollando (po 1). Ĝis nun Francio havas 486 sukcesintojn, el la nunaj 21 ekzameniĝintoj certe sukcesos 14, do, Francio havos pli ol 500 diplomitojn. Detalajn informojn (fotojn, gazetarajn komunikaĵojn, liston de la helpintoj ktp) troveblas sur la paĝo de la 6a Tutmonda Sesio.



Jen grupo, kiu ariĝis en Subotica, Serbio, por la kultura programo aldone al la ekzamena sesioj.

Fotoj: La vicdirektorino de la Politeknika Lernejo, kiu jam de kelkaj jaroj gastigas ekzamensesiojn: Gyöngyi Arancsity Dancsa. Ŝi tenas sigelitan ekzamentaskan koverton tuj antaŭ ol ŝi malfermas ĝin. Dekstre: Tutpaĝa artikolo pri la ekzamena sesio en la hungarlingva gazeto Magyar Szó. Ĉiujare aperas tiom ampleksa artikolo. Jen praktika ekzemplo, kiel ekzamena sesio povas ludi utilan rolon en nia informa laboro. Fotoj: László Aranka.





Eszperantó vizsganap

*A szabadkai Politechnikai Iskolában öt személy vizsgázott*

**A hétvégén a Politechnikai Iskola harmadik alkalommal volt házigazdája a Világméretű Eszperantó Vizsganapnak, amikor is egy időben 13 ország 17 városában került sor a közel 130 jelentkező vizsgáztatására. Az idei vizsganapon többek között részt vett az Amerikai Egyesült Államok, Kolumbia, Brazília, Kína és Oroszország is, szombaton pedig még Japán bővíti a rendezvényt egy újabb csoporttal.**

**Proksimaj ekzamenebloj estos:** Tokio en Japanio (17an de junio), Teruel en Hispanio la 24an de junio, Herzberg en Germanio, Raleigh en Usono, dum la landa kongreso kaj dum la kursaro NASK kaj finfine Seulo, dum la  UK. Aliĝebloj, krom al la sesio en Tokio, troveblas ĉe edukado.net/ekzamenoj/sesioj

## 385 diligentaj legantoj

La maja sumoo-konkurso (la 46a) sukcese okazis. Ĝi altiris 385 partoprenantojn el 31 landoj. Vidu detalojn en la retejo: http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html. La projekto celas sproni al la legado de Esperantaj libroj. La julia sumoo okazos frue, inter la 2a kaj la 9a de julio (8 tagoj) ĉar multaj estos okupitaj pro diversaj aranĝoj en Esperantujo.

## Bunda aktivas, ankaŭ post la Kongreso

Bunda estas urbeto en Tanzanio apud la lago Viktorio, kiu sukcese okazigis la 6an Afrikan Kongreson de Esperanto fine de 2016. La urbo kaj regiono havas longan historion de aktiveco pri Esperanto. Jen koncizigo de raporto pri la agado en majo 2017.

Okazadas instruado de la lingvo, kunvenoj kaj Esperanto-eventoj kaj regula raportado al ILEI kaj UEA. Bunda aktivas tra la tuta provinco de Mwanza: en majo oni sukcesis kontaktiĝi kun s-roj Jayrous Eliakimu en Mwanza, Fidel Simeo en Geita, Barnabas Magese en Kayanga,Charles Hiza en Tanga, John Magessa en Muleba kaj s-ino Euserbia  Mathias en

Mwanza. Aliaj estas s-roj Hassan Gilala en Sengerema, Emanuel Lyimo en Shinyanga kaj Wilson Matoyo en la vilaĝo Bugoji.

La lokuloj kunlaboras kun la landa ILEI- sekcio (IST) por la lingva instruado, por serĉi lernmaterialojn por la komencantoj, progresantoj kaj kursgvidantoj. Por atingi la ejojn de E-eventoj oni proponis ricevi subtenon de UEA aŭ helpagadon de interesiĝantoj kiuj volonte akceptas subteni nian agadon kaj donaci por ĝi. Krom tio oni okazigis duontagan Esperanto-kurson ĉi-monate en Bunda; la nombro de la partoprenintoj kreskis kompare kun la sama kurso en aprilo, kio donas impulson daŭre okazigi tian kurson.

En junio okazos Esperanto- kurso en la dua plej granda urbo en Tanzanio, Mwanza, detaloj pri la urbo ĉe https://eo.wikipedia.org/wiki/Mwanza. La kursejo estas la elementa lernejo Ruwasa; por pli da informoj rilatu kun Jayrous Eliakimu (jayrouseliakimu@yahoo.com)

En la sama monato okazos kurso por la junuloj kaj infanoj en Bunda: por tiu kurso kontakti kun s-ro Paul Katuju Kusaya (pauljoseph115@gmail.com)

Por septembro (18-22) oni proponis okazigi seminarion por la progresantoj en Bunda. Por subteni la seminarion kontakti kun s-ro Mulele Mbassa, p.o.box 25 Bunda Mara Tanzanio. (mulelembassa@gmail.com)

## Novaj estraroj en Francio kaj Nepalo

Espéranto-France havis sian kongreson de la 25a ĝis la 28a de majo en Mandres-les-Roses apud Parizo. La membraro elektis novajn membrojn de la komitato, kaj siavice la komitato elektis novan estraron, en la jena konsisto: Prezidanto : Axel Rousseau; Vicprezidanto : Didier Loison; ĝenerala sekretario : Sylvain Barrier; vic-sekretario : Emmanuelle Richard; Kasisto: Sébastien Montagne; Vic-kasisto: Anne-Emilie Ravache.

*Claude Nourmont*

Okazis la 24a Jara Kunveno de Nepala Esperanto-Asocio fine de majo en Itahari, en la orienta parto de Nepalo; partoprenis ĉ 53 homoj, la plimulto lokuloj kaj multaj novuloj. La Prezidanto de NEspA, Indu Devi Thapaliya, kaj la prezidanto de la Orienta Nepala Esperanto-Societo (ONES) s-ro C. Pokharel komune inaŭguris la kunvenon. La agadaj kaj financaj raportoj de NEspA estis akceptitaj. ONES elektis sian novan estraranon: Prezidanto: s-ro Shree Prasad Pokharel, Vicprezidanto: s-ro Ganesh Neupane, Ĝenerala sekretario: s-ro Ganesh Niraula, Sekretario: s-ro Santosh Dhamala, Kasisto: s-ro Ashok Kumar Adhaikari, Membroj: s-ino Sulochana Adhikari kaj s-ro Amrit Basnet. Fine, la prezidantino dankis al ĉiu pro la sukcesigo de la jara kunveno kaj gratulis la nove elektitajn estraranojn de ONES. Ŝi ankaŭ dankis al Chol Nath Pokharel, la antaŭa prezidanto de ONES, pro lia valora laboro en 17 jaroj en la orienta parto de Nepalo.

*Bharat kumar Ghimire*

## Nova interlingvistika grupo kaj simpozio en UAM

La **Interlingvistikaj Studoj** de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) iĝas **20-jara**, kion ni festos dum la **4a Interlingvistika Simpozio** en septembro 21-22, tuj post la unua sesio de la nova interlingvistika grupo kaj antaŭ la kultura festivalo Arkones.

La simpozio havos specialan sekcion dediĉitan al **Zamenhof**, kaj estas malfermita al la granda publiko kaj temos pri problemoj de internacia komunikado. La temo de la simpozio estas: Rolo de internaciaj lingvoj ekde la epoko de Zamenhof ĝis la nuntempa multkultura mondo. La limdato por prelegproponoj: 25.06.2017.

Informoj troveblaj pri la simpozio kaj pri la ebloj por la trijara studprogramo en la retejo de la Studoj: http://www.amu.edu.pl/~interl/

Vortoj: 885



Urboj kun rektaj flugligoj al Poznano, grandparte per modestprezaj kompanioj

(datumoj el 2016)

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj..